Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 24 — trimonata

3/94

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

CHARTERS, Duncan, Salutmesaĝo al la 28a Konferenco de ILEI 1
GLOSSOP, Ronald, Ferma Parolo kaj Rezolucioj de la Konferenco 6
GUBBINS, Paŭlo, Pri la Esperanta partopreno: ĉu hurdo malaltigota? .. . 9
Pedagogia Kalendaro (Karlskoga, Budapeŝto, Övik, k.a.) 16
29a Konferenco de ILEI en Övik, Finnlando. Informoj kaj aliĝilo 17
Mendilo de la Libroservo de ILEI 20
BOURLOT, Carlo, Raporto pri la enkonduko de la I.L.-o en italan bazan lernejon 21
Alvokoj kaj mallongaj informoj 33
Kontribui alt-nivele al IPR (praktikaj konsiloj por komputil-uzantoj ... 34
MACGILL, Stefan, Tubero en l'afero kaj fermaj vortoj 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *(Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado)*
Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*
Sekretario: Marija Beloŝevič, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*
Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*
Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Nia gazeto IPR urĝe bezonas pli da aktivaj kunlaborantoj kaj pli vastan gamon de kontribuantoj. Ĝi serĉas novajn membrojn por la redakcia teamo, prefere kun komputila aliro kaj sperto. Vidu paĝojn 34 kaj 35 kaj la dorsan kovrilon por detaloj. **Anoncu vin al la komisiito pri eldonado.**

Salutmesaĝo al la 28a Konferenco de ILEI
en Universitato Kangnam, Koreio, 1994

Duncan Charters, Prezidanto de ILEI

Karaj konferencanoj,

Kvankam mi multe dezirus esti inter vi persone por partopreni ĉi tiun unikan konferencon de ILEI en Azio, la cirkonstancoj devigas min saluti nur perletere. Mi tamen ĝojas, ke povos anstataŭi min nia vicprezidanto D-ro Ron Glossop, kaj mi scias ke sub lia gvido via laboro kune estos instrua kaj fruktodona.

Kiel mi atentigis en mia novjara salutmesaĝo en IPR, multon ni jam atingis kaj ankoraŭ atingas per relative malmultaj homfortoj. Tamen por ke niaj fortostreĉoj havu maksimuman efikon, ni bezonos daŭre profesiigi nian organizadon, plifortigi la strukturon de niaj landaj sekcioj, kaj antaŭprepari nin por la gravaj antaŭenpaŝoj kiuj povos malfermiĝi al ni en la baldaŭa estonteco.

Ni konstatu, kio estas jam atingita dum la pasinta jaro. Sukcese eldoniĝis la lasta el la tri-kajera serio de *Tendaraj Tagoj*, kies dua kaj tria partoj jam montriĝis efika lernilo en inter-alie la ĵus fininta kursaro ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko. Kaj la eldono fare de Edistudio de la lernolibro *Kunvojaĝu* de Paŭlo Gubbins certe donos plian impeton al niaj instrukapabloj provizante ĝisdatan instrumaterialon internacie uzeblan. *Juna amiko* daŭre atingas sian celon provizi taŭgan legomaterialon por gejunuloj, kaj la *Internacia Pedagogia Revuo*, kvankam ĝi ĉi-jare iom perdis la eldonritmon (kiun ni devis rekapti per la aperigo de duobla numero), restas utila komunikilo pri nia agado kaj edukaj demandoj ĝenerale. La pasintjara apero de la metodika instrulibro de Mag. Irena Szanser provizis al instruistoj utilan materialon pri instruteorio kaj praktiko ne antaŭe eldonitan en Esperanto. La pasintsomera instrutrejna programo por instruistoj okazinta ĉe la Kultura Centro Esperantista en Svislando, sub la aŭspicio kaj kun forta financa apogo de ILEI, preparis plurajn instruistojn kiuj reiris al siaj landoj kaj povis rezulte pli efike labori en siaj klasoj. La tri ĉefaj kontribuintoj al tiu programo, Duncan Charters, Stefan MacGill, kaj Katalin Smidéliusz, povis daŭrigi, dum la jaro kaj ĉi-somere, siajn kontribuojn al la plifortigo de la instruado en diversaj lokoj de Eŭropo kaj Ameriko.

Tio neniel elĉerpas la raportojn pri nia agado internacie kaj en la landaj sekcioj, kiel vi certe konstatos dum la nuna konferenco. Efektive, ni troviĝas ĉe la sojlo de projektoj kiuj povos, se ili realiĝos, plivastigi nepridubeble la eblecojn instrui Esperanton multe pli amase kaj efike. Pri tiuj vi havos la okazon informiĝi dum la konferenco, kaj en viaj diskutoj vi certe havos ideojn pri ilia antaŭenigo. Permesu al mi mencii du el ili.

Unue, vi sendube ĉiuj aŭdis pri la projekto *Fundapax* kaj ĝia intenco kunlaborigi multajn lernejajn klasojn tra la mondo pri pacedukado pere de la lernado de Esperanto. ILEI kompreneble staras preta kunlabori kun la projekto laŭ siaj fortoj kaj kapabloj. Jam kunlaboras diversaj landaj sekcioj informinte al la organizantoj pri la preteco de instruistoj kaj lernejoj partopreni en la projekto. Kaj ni povos tuj disponigi lernilojn kiel *Tendaraj Tagoj* kaj *Juna amiko* laŭ la eventuale bezonataj kvantoj. Krome, pluraj el niaj aktivuloj certe povos kontribui diversmaniere rilate la preparon de instrumaterialoj kaj instruistoj, kaj kiel konsultantoj pri la projekto. Se tiu ideo povos realiĝi, ĝi estas tia internacia eksperimento kiu havos la eblecon pli klare demonstri la valoron de la instruado de Esperanto en la lernejoj.

Efektive, jam la propedeŭtika valoro de la instruado de nia lingvo en la elementaj lernejoj estas forta argumento por kuraĝigi ĝian lernadon, sendepende de la uzebleco de la lingvo mem kaj ĝia valoro por montri la vojon al tiuj idealoj kiuj povos rezultigi plireciproke kompreneman mond-popolon. Laŭ propono de la finna sekcio de ILEI kiun vi espereble diskutos kaj povos eventuale aprobi dum la konferenco, en Tampere ni povos dediĉi la *Tagon de la Lernejo* precize al tiu temo. Ni konstatu kion ni jam scias pri tiu valoro, kaj pretariĝu por pli klara evidentigo de tio antaŭ la publiko kaj la decidofarantoj en la landaj eduksistemoj. Ni ne forgesu, se realiĝos la projekto *Fundapax*, ke ni utiligu ĝin maksimume ankaŭ por tiu celo, ebligante objektivan studadon pri la akirebleco de nia lingvo kaj ĝia uzebleco kompare kun kaj prepare al la studo de aliaj lingvoj.

La evoluon de la teknologio kaj ĝiaj aplikeblecoj al la internacia kunlaborigo kaj klerigo ni konstatis dum la diskuto de la Kongresa Temo ĉe la Universala Kongreso pasintjare en Valencio. La raporton pri la temo de la klerigo por la 21-a jarcento mi ankoraŭ redaktas, sed ĝi verŝajne eldoniĝos venontjare kaj ĝi provizos utilan materialon por nia laboro en tiu pli vasta kadro. Jam la internaciaj komputilaj retoj donas al ni eblecojn de tuja komunikado kiujn ni ne havis ĝis la nuna jardeko.

Efektive tiaj kontaktoj povos sukcesigi projektojn kiel *Fundapax* kiuj eventuale havos relative malmultajn organizajn homfortojn sed kiuj povos per rapida kaj efika kunlaborigo de aliaj atingi rezultojn neimageblajn antaŭe.


Krome, komputilaj programoj lastatempe aldonis la eblecon ne nur de programita lernado laŭ skribita teksto, sed povas utiligi grafikaĵojn, sonon sufiĉe klaran por esti prononcmodelo, kaj eĉ moviĝantajn desegnojn kaj filmon. Pri la evoluo de la leciono povos ĉiam pli multe decidi la lernanto mem. Tiaj programoj, por memstudado aŭ plifortigo de la klas-instruado, jam estas preparataj por Esperanto. Sed ni atentigu pri alia teknologia rimedo kiu povos provizi al ni treege efikan materialon por instruado al infanoj kaj plenaĝuloj, en klasoj kaj per memstudado: t.e. video, kiu ebligas la produktadon de kursoj kaj materialoj utiligeblaj ĉie kie disponeblas vidbend-aparato.

Jam de jaroj oni diskutis la eblecon instrui Esperanton per televida kurso, kaj jam kelkaj tiaj projektoj malgrandskale kaj ne tre profesie realiĝis. Post multe da pripensado kaj diskutoj, ŝajnas ke ni estas pretaj antaŭenigi du projektojn kiuj kune provizos taŭgan video-materialon kiu pliefikigos kaj nian varbadon por la instruado de Esperanto kaj tiun instruadon mem.

La unua estas ideo jam longe pripensita: intenacia kurso tute en Esperanto kiu prezentos la lingvon interese kaj praktike per situacioj kun vivantaj aktoroj, kaj kiu povos montri per tiuj situacioj la kulturan valoron kaj praktikan utiligeblecon de nia lingvo. Ni jam kunlaboras internacie cele al realigo de tiu longe sopirata projekto, kaj havas financan bazon, la eblecon de teknika kunlaboro interne de nia propra movado, kaj personojn kiuj povos dediĉi sian tempon kaj talenton al la tekstoverkado kaj prilaboro de akompanonta materialaro. La nuna koncepto inkluzivas realigon de 10 lecionoj duonhoraj, kiuj prezentos realecajn situaciojn (familia lernado de Esperanto cele al praktika apliko) kaj enhavos la bazan strukturon de la lingvo necesan por konversacia komunikado. La koncepto havos profesinivelan realigon, estos originala por Esperanto kaj povos tiel ekspluati ĝiajn apartajn karakterizajojn kiel lingvon kaj internacian komunikilon, kaj prezentos la lingvon tiel ke ĝiaj kvalitoj kaj praktika uzebleco tuj evidentiĝu. Akompanajn materialojn oni povos evoluigi en ĉiu aparta lingvoteritorio por nacia aŭ regiona utiligo. Kvankam la kurso celos aparte junajn personojn (ekz. mezlemejanojn kaj universitatanojn), la uzo de diversaĝa familianaro

ebligos facilan identiĝon kun la situacioj por pli junaj kaj pli aĝaj spektantoj.

Tute alia projekto kiu komencis evolui dum la pasinta jaro estas Esperanta traduko de la internacie konata brita videokurso *Muzzy*. Versiojn oni jam havas en pluraj lingvoj kaj nun preparas por multaj aliaj. Kunlige kun la pola traduko kiun oni faras en Pollando, ni laŭraporte sukcesis akiri la rajtojn fari similan adapton al Esperanto. Nia Stefan MacGill jam preparis tekston por la dek du lecionoj de Mazi, kaj krome tradukis la kantojn. La realigo de provbendo laŭ tio donas la impreson, ke la projekto estas realigebla ankaŭ por Esperanto. Eble vi havis okazon vidi mallongan provlecionon dum la U.K. aŭ havos dum ĉi tiu konferenco aŭ poste. Temas pri diverspersona (kaj fakte diversbesta) desegnita aktoraro kiu prezentas rakonton kaj la lernotan gramatikon laŭ amuza maniero. Kvankam unuavide ĝi ŝajne ĉefe celas junajn infanojn kaj geknabojn, kaj por hejma uzo ĝi ĉefe vendiĝas al tiu publiko tra iliaj gepatroj, en multaj landoj ĝi montriĝis sukcesa por ĉiuj aĝgrupoj en diversaj situacioj. Oni trovas ĝin en lernejoj, universitatoj, kaj kursoj por plenaĝuloj. La materialo ofte servas aŭ kiel enkonduko al la lingvo, aŭ kiel amuzaj plifortigaj aŭskultokompren-ekzercoj uzataj kunlige kun la normala kurslibro.



Ambaŭ projektoj ŝajnas esti tre utilaj por nia laboro, kaj espereble ILEI povos subteni tiun evoluon laŭ ĝiaj ebloj. Por ambaŭ kursoj, la landaj sekcioj povos okupiĝi pri la verkado de aldonaj materialoj kiuj faros la kursojn pli utilaj kaj kompletaj kiel bazan enkondukon al la lingvo aŭ kiel aldone uzeblan materialon.

Tiuj projektoj estas kompreneble relative altkostaj, kvankam espereble ne ekster la rimedoj de la movado (kun aŭ sen ekstera helpo). Sed en ĉiuj landoj ni povas krei materialojn por uzo ne nur de komencantoj sed

ankaŭ de progresintoj. Ne estas malfacile foti por vidbendo naciajn kaj internaciajn aranĝojn, konversaciojn inter spertaj esperantistoj, kaj aliajn materialojn kiuj estus facile utiligeblaj per aldono de iom da skribita materialo (vortlistoj, demandoj, eventuale ekzercoj). Pensu pri tio, kio estos ebla en via lando aŭ regiono, per propraj rimedoj, kaj eble ni ankaŭ povos evoluigi materialon intemacie uzeblan tiurilate. Tio certe ne estas ekster niaj normalaj financaj rimedoj, kaj povos multe servi al la plifortigo de la lernado por tiuj kiuj jam estas konvinkitaj kaj laborantaj movadanoj.

Por mi persone estis surprizo kaj honoro elektiĝi kiel Prezidanto de ILEI antaŭ unu jaro en Valencio. La eksiĝo de Stefan MacGill devigis organizajn ŝanĝojn en la strukturo de la Ligo, aparte pro tio ke ĝia agado ne povas dependi de unuhoma prezidanta motoro. Kiel mi atentigis okaze de la elektoj, tian rolon mi ne povis plenumi pro aliaj respondecoj, kiuj dum la pasinta jaro estis aparte postulemaj. Tiu fakto malhelpis efektivigi mian deziron esti maksimume respondema kaj kiel eble plej multe aktiviĝi subtene al la laboro de la Ligo. Pri tio mi dankas la komprenemon de miaj kunlaborantoj, kaj mi feliĉe povos antaŭvidi pli aktivan rolon dum la venonta jaro pro forfalo de kelkaj el la antaŭaj ŝarĝoj. Tamen ĉiu individua membro, ofichavanto, kaj landa sekcio ekzamenu sian rolon kaj potencialan kontribuon, ĉar nur kune laborante ni povos progresigi la aferon kaj elprofiti la nunajn vere favorajn cirkonstancojn. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu aŭ ne mi povos esti kun vi en Finnlando, sed se iel eble mi deziras partopreni kaj denove kunlabori kun multaj el vi persone. Ĉio aŭguras bone kaj por la U.K. kaj por nia konferenco, kaj mi antaŭvidas ke tiu konferenco povos esti kulmino de escepte progresiga jaro en nia diverskampa laboro.

Per tiuj vortoj mi finas mian salutmesaĝon al vi, kun espero ke ĉiuj konferencanoj maksimume profitos la unikajn eblecojn konatiĝi kun la azia movado, kaj aparte kun ĝiaj edukaj ideoj, celoj, kaj sistemoj. Kun granda danko al ĉiu el vi, al miaj kolegoj en la Estraro de ILEI, kaj al D-ro So Jinsu kaj la lokaj organizantoj de la konferenco, mi sendas miajn bondezirojn kaj atendas fruktodonajn rezultojn de la konferenco, kiel ankaŭ de nia venontjara laboro por ILEI kaj la instruado de Esperanto tutmonde.

Duncan Charters, Prezidanto de ILEI

Ferma Parolo por la 28-a Konferenco de ILEI

de Vic-Prezidanto Ronald Glossop

Ni nun venas al la fino de la 28-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĉar ĝi estas la unua ILEI-konferenco en Azio, oni anticipis, ke ĝi estos iom malsama ol pasintaj konferencoj. Efektive, ĝi estis. Laŭ la temo "La aziaj edukado kaj kulturo" ni ricevis multe da informoj pri esperantistaj agadoj en Azio, ofte de homoj kiuj neniam antaŭe ĉeestis internacian esperantistan konferencon. El 48 partoprenantoj el 25 landoj, 22 homoj venis el aziaj landoj, plejparto per la helpo de Universala Esperanto-Asocio.

De la komenco ĝis la fino ni sentis la etoson de Koreio. Ni manĝis koreajn manĝojn en diversaj koreaj manĝejoj. Ni dumsemajne loĝis en korea urbeto Yongin. Ni vizitis korean popol-vilaĝon por vidi malnovajn koreajn domojn kaj domegojn. Ni iris en la korean kamparon pro vidi Budhanajn statuojn kaj sanktejojn. Danke al D-ro Joong Yun Cho, Rektoro de Kangnam Universitato, ni spertis bonegan modernan korean bankedon. Kangnam Universitato mem provizis lokojn por niaj klasoj kaj niaj kunsidoj. La universitato ankaŭ provizis nian manĝejon kaj nian transporton.

Kion ni faris? Ni multe babilis kaj tiel ni konatiĝis kun novaj amikoj kaj rekonatiĝis kun amikoj de antaŭaj konferencoj. Ni manĝis. Ni kantis. Ni marŝis kaj veturis aŭtobuse. Ni aranĝis loterion por gajni monon por helpi ĉeestontojn de konferencoj kaj kursoj de ILEI. Ni aŭdis raportojn pri instru-agadoj kaj la verkado de instru-materialoj en multaj landoj. Ni akiris multajn novajn membrojn.

Ni eĉ iom laboris kaj studis! La klaso pri instruado de Esperanto kunvenis ĉiutage. Dek ses ĉeestantoj sukcesis ekzameniĝi dum la semajno. La Komitato de ILEI, pro manko de kvorumo, konsentis prokrasti la voĉ-donon por novaj estraranoj dum unu jaro (do ĉiuj nuntempaj estraranoj restos almenaŭ dum tiu jaro). La Komitato decidis daŭrigi ĉiu-jarajn konferencojn. Ĝi decidis dum 1995 konferenci en Finnlando (vidu aliĝilon gazet-meze) post la Universala Kongreso de UEA en Tampereo. Ĝi decidis ke en 1995 la temo por "La Tago de la Lernejo" ĉe la UK kaj ankaŭ la temo por la ILEI-Konferenco mem estos *La Propedeŭtika Valoro de Esperanto*. Ĝi diskutis agadojn de la pasinta jaro kaj la celon en la estonteco uzi novajn instruilojn kiel vidbendojn kaj komputilojn. Ĝi diskutis la dezirindecon havi liston de ĉiuj membroj

❶ La 28-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la unua en Azio, kunveninte en Universitato Kangnam, Koreio, inter la 30a de julio kaj la 5a de aŭgusto, 1994,

(a) **esprimas** sian altan aprezon al la direktoro de la universitato, al la estro de la internacia fako, kaj al profesoroj kaj personaro de la universitato, pro ilia granda subteno al nia konferenco;

(b) **direktas** sian dankon al la koreaj esperantistoj pro ĉiama helpo kaj bonvolo, tiom pli efika ĉar, pro la lingva problemo, malfacile kontaktiĝas la ĝenerala publiko;

(c) **rekonas** la elstaran meriton de la prezidanto de la LKK, kiu ne nur kuraĝe prenis sur sin la tempo-raban, ofte probleman organizadon de la unua ILEI-Konferenco en Azio, sed kiu ankaŭ havigis la tre valoran kunlaboron de sia universitato, kaj lerte reĝisoris festan kaj ekskursan programojn kulturriĉajn, delikate instruantc la landan etiketon kaj spertigante lokajn morojn sen troa suferigo, eĉ intervenante kie helpa mano estis bezonata; kaj

(d) **esprimas** sian respekton pri la kultura kaj homa civilizo en la gastiganta lando, esperante daŭrigi la bonajn kontaktojn kaj substrekante la gravan rolon de Esperanto-instruado por glatigi interhomajn rilatojn egalrajtajn.

❷ La 28-a Konferenco ...

Konfrontite kun la malfacilajoj kiujn Esperanto-instruado renkontas tra Azio kaj alikontinente, sed ankaŭ informite pri la rezultoj de ofte plurjardeka preparado de la grundo **atentigas** pri la graveco de persista, prefere profesinivela laborado en la instrua kampo, kaj **alvokas al la instruistoj de Esperanto** neniam rezigni, sed daŭre perfektigi sian lingvo-uzadon, kaj aliflanke ebligi al Esperanto-instruantoj en malpli favoraj cirkonstancoj, perfektigi sian lingvan kapablon, sin klerigi pri la Esperanto-kulturo, kaj partopreni plenrajte en la movado.

❸ La 28-a Konferenco ...

Alvokas al UEA pli forte subteni la agadon de ILEI kiel unu el la esence gravaj fakaj asocioj, i.a. **instigante** siajn membro-instruistojn kaj instruantojn de Esperanto membriĝi al ILEI kaj **rekomendante** al ĉiuj membroj ĉiujn nivelojn de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.

❹ La 28-a Konferenco ...

Spektinte la amuze allogan instruan vid-bendon *Mazi en Gondolando*, famiĝintan jam por alilingva instruado, kaj **informite** pri tute alispecaj vidbendaj kursoj por Esperanto preparataj, **laŭdas** la iniciatojn kaj donas al ili sian moralan subtenon.

krom la listo por la elsendado de IPR. Ĝi elektis s-inon Audrey Childs-Mee kaj s-ron Oene Hoekstra honoraj membroj. Ĝi akceptis Rusion kiel novan landan sekcion. Ĝi diskutis la bezonon por nova flugfolio por informi aliulojn pri ILEI. Ĝi decidis por la malfermo de la diskuto pri la Statuto de ILEI.

La Komitato formale akceptis kvar rezoluciojn, kies tekstojn vi povas legi sur la antaŭa paĝo.

Je ĉi tiu momento, Atilio Orellano Rojas prezentis diplomojn al tiuj kiuj partoprenis en la instru-kurso, kaj Marija Beloŝevič prezentis atestilojn al la sukcesintoj pri la internaciaj ekzamenoj.

Je la fino de ĉi tiu konferenco necesas esprimi multe da dankoj al difinitaj individuoj. En la unua rezolucio ni esprimis niajn dankojn al Universitato Kangaam kaj al la Loka Konferenca Komitato, sed la rezolucio ne menciis nomojn. Mi nun volas fari tion. Ni tre dankas al Jun Myungyong, Yang Oknam, So Gilsu. kaj aparte So Jinsu, kiu estris tiun komitaton. Ni volas danki al Atilio Orellano Rojas kiu gvidis la Cseh-kurson. Ni volas danki al Rob Moerbeek, kiu multe kaj bone laboris kiel nia protokolanto por la Komitato de ILEI. Ni volas danki al la komitato pri rezolucioj: Doroteo Holland, Niza Kuiterman, Nora kaj Rob Moerbeek.

Plej laŭdinda por ni estis la grava kaj granda laborego de Marija Beloŝevič. Ŝi ne nur estis nia sekretariino kun informo kaj sugestoj kaj proponoj kaj ideoj, sed ŝi ankaŭ faris tri aliajn gravajn taskojn samtempe! Ĉar Bertil Andreasson ne povis ĉeesti, Marija rolis kasisto dum la konferenco. Plie, ŝi estris la ekzamenojn por ni. Kaj krom tio, ŝi direktis la libroservon. Do ŝi faris kvar apartajn tre gravajn taskojn. Marija, ni dankegas vin. Sen vi ĉi tiu konferenco tute ne estus eblinta.

Nun ni konscias ke ni staras ĉe la **fino** de tre agrabla sperto. Samtempe, ni kredas ke ĉi tiu konferenco estas la **komenco** de nova periodo, tempo kiam Esperanto vere iĝos lingvo ne nur por eŭropanoj kaj tiuj en okcidentaj landoj sed por ĉiuj homoj tra la tuta mondo.

Tiam ni kantis la porinfanan kanton kun melodio "Frata Ĵako" kaj ĉi tiuj vortoj:

Sur la Tero, bela Tero, Loĝas ni, kantas ni.
Kune sur la Tero, Monda familio, Famili', famili'.

Laste ni kantis la esperantan himnon "La Espero" por fermi la konferencon.

Pri la Esperanta participo: ĉu hurdo malaltigota?

UNU el la plej timigaj hurdoj, kiujn devas transsalti ĉiu nova esperantisto, estas la participa. Se lingvo-lernado egalas specon de hurdo-kurado, stumblas kuranto (se brita) plej verŝajne ĉe akuzativo-hurdo, sendube ĉe participo-hurdo. Do, bone: oni parkerigas la regulojn; oni sin lingve ekzercas; oni en la klasĉambro substantive, adjektive, adverbe *int-ant-ont-* kaj *it-at-ot-*umas. . . sed apliki la teoriojn oni ofte ne emas, ne volas, ne kuraĝas.

Ironie, ke la unusola participo, kiun lernanto kun fido surpaperigas, elbuŝigas (plej verŝajne sen rekono de ties gramatika signifo) estas la *ant-*formo entenata en la nomo de la lingvo mem.

Ironie, sed memkompreneble: se temas pri kompleksaj, kunmetitaj verboj, ĉiu instruisto (krom tiuj kun analizskolaj tendencoj) avertas kontraŭ participo-eksceso, simple sekvante la konsilon de la plej granda Esperanto-instruisto, d-ro Zamenhof. *En Lingvaj Respondoj* tiu lakonis: "La formojn kunmetitajn (ekzemple: 'mi faradas, mi estis farinta ...' kaj ceterajn) oni devas uzi sole tiam, kiam la senco ĝin necese postulas."[1]

Same resumas Kalocsay kaj Waringhien en *Plena Analiza Gramatiko:* "Cetere ĉiuj ĉi kompleksaj tempoj estas pezaj kaj mallertigas la frazon. Tial oni malofte uzas ilin, krom la kelkfoje postulatajn preteriton kaj futuron perfektajn [n.d.l.verkinto: estis/estos kaptinta]. Por eventuala nuancado de la tempoj, oni prefere uzas la adverbojn *ĵus* (proksimume respondan al la perfektaj tempoj) kaj *tuj* (proksimume al la prediktaj tempoj)."[2]

La kontraŭ-participa kampanjo limigas sin ne al kunmetitaj verboj. Stilistoj, kiaj ekzemple Faulhaber, substrekas la principojn de sufiĉo kaj neceso en Esperanto. Li atentigas pri la balasta uzado de adverba participo anstataŭ simpla adverbo (ne: La mastro minacante rigardis lin, sed: La mastro minace rigardis lin; ne: La fratineto estis tiel ĝenanta, sed: La fratineto estis tiel ĝena).[3]

Kompatindaj participoj: ĉiuflanke bombardataj! Sed ne nur aktive minacataj; ankaŭ pasive, inside subminataj de antaŭjuĝo nacilingva kaj kutimo. Ĉar fakto: Esperanto – almenaŭ ties participoj – prezentas trezoron, riĉecon plene mankantan al la plimulto da aliaj vivantaj lingvoj.

Alivorte: uzantoj de Esperanto simple ne rekonas, des malpli ekspluatas la participan potentialon de la lingvo.

Ekzemple: komparu la frazon *"Spektonte la filmon,* mi ekrimarkis mian kolegon" kun nacilingvaj ekvivalentoj. Kiel traduki la tri kursivajn vortojn angla-, franc- aŭ german-lingven? Anglalingve: *"About to watch the film* I noticed my colleague" sonas lernejlatineca (ĉiu, studinte la latinan, memoras rigidajn, artefaritajn tradukojn tiajn: "*Caesar having left the winter quarters. . .* "). Pli flua, pli belsona, pli natura (certe en la parola lingvo) jenas: *"As I was about to watch the film / I was just about to watch the film, when. . .* ": do pli da vortoj ol la Esperanto-triopo sed, pli signife, en la unua kazo subpropozicio enkondukita ne de participo sed de prepozicio kaj, en la dua, la esperanta adverba subpropozicio fariĝas en la angla ĉefpropozicio.

Same la franca: *"[j'etais] sur le point de rigarderle film / le film etait sur le point de commencer* [quand] j'ai remarqué mon collègue": denove nenia participa frazero sed ĉefpropozicio sekvata de subpropozicio mem enkondukata de konjunkcio. Kaj la germana: *"Ich war im Begriff, den Film zu sehen / Ich wollte gerade den Film sehen*, als ich meinen Kollegen bemerkte": same kiel en la franca: ĉefpropozicio plus subpropozicio.

Rezulte: konsiloj stilaj kun trajtoj nacilingvaj insidas – almenaŭ en la parola lingvo – por suspektindigi, ja pariigi Esperanto-participojn. Akceptite, ke troa uzado de verboj kunmetitaj pezigas la lingvon, sed ŝajnas, ke la "kunmetita" malsano (alivorte: evitu la formon "estis/as/os plus participo") infektis ĝeneralan, pli vastan participan uzadon. Eĉ bazaj esploroj, ja la atesto de la propra orelo, montros, kiom malofte en la parola lingvo aŭdiĝas participo – ĉu substantiva, adjektiva, adverba.'

Do okul-, pli ĝuste orel-frapas, kiom raras participoj en la prelegoj kaj konversacioj de eĉ eminentaj esperantistoj. Se oni konsideras prelegerojn (sonbendigitajn, respektive vidbendigitajn dum somerlernejoj en Barlaston, Britio, inter 1985 kaj 1993) fare de akademianoj, oni povas ne nur participo-rarecon sed ankaŭ individuajn stil-trajtojn konstati. Profesoro Paul Neergard, ekzemple, prelegante en 1985 pri "Enkonduko de novaj vortoj en Esperanton", ene de 20 minutoj uzis sekvantajn participojn:

minutoj	*participo*	*minutoj*	*participo*
5.30	tradukanto	13.20	establitaj
7.40	uzanto	14.15	enkondukota
8.00	uzata	14.50	uzata
9.20	konata	17.40	enkondukota
10.00	(kiel) dirite	19.40	establita

Notindas la ripetita uzado de *uzata* kaj *enkondukota*, kaj de singulara kaj plura formoj de *establita(j)*. Se oni ignoras la formojn ripetitajn, oni konstatas averaĝan uzado-kvoton de unu participo ĉiun duan minuton (10 dividita de 20). El la 10 participoj rimarkindas, ke temas pri sep adjektivaj participoj, du substantivaj, kaj unu adverba. Mankas kunmetitaj verboj.

Ĉe Marjorie Boulton, prelegante en 1992 pri "Esperanto: ĉu eŭropa lingvo?", oni konstatas jenon:

minutoj	*participo*	*minutoj*	*participo*
1.25	komencanto	9.10	limigita
2.20	ekzistanta	9.20	limigita
2.50	elektitaj	9.55	elektante
3.30	inkluzivantaj	10.00	disvastigita
4.20	bazitaj	10.10	elektante
5.15	fuŝita	10.20	distribuita
8.15	reganta	14.40	konataj
8.45	uzata		

Konstateblas denove ripetitaj participoj – *limigita* kaj *elektante* – sed, inkluzivante ĉiujn ekzemplojn, montriĝas averaĝa uzado-kvoto de unu participo ĉiun minuton (15 dividita de 15) : hazarde duoble pli ofte ol ĉe Neergaard. Temas ĉe Boulton pri 12 adjektivaj, du adverbaj kaj unu substantiva participoj. Rimarkindas denove, ke abundas la adjektiva formo de la participo kompare kun la adverba aŭ la substantiva: same mankas kunmetitaj verboj.

En 1993 Georgo Kamaĉo prelegis en Barlaston pri la temo: "Ĉu verki aŭ ne verki Esperante?" Hazarda, 15-minuta kontrolo liveris jenajn rezultojn:

minutoj	*participo*	*minutoj*	*participo*
1.30	ekzistanta	9.10	transformita
4.00	ekzistanta	11.30	verkitaj
4.20	verkita	14.00	ludita
8.20	kunmetita		

Averaĝa uzado-kvoto (7 dividita de 15) montras unu participon ĉiun duan minuton kaj dek kvar sekundojn (do malpli ofte ol ĉe Neergaard): temas ekskluzive pri la adjektiva formo de la participo. Ankoraŭfoje mankas kompleksaj verboj.

Pli interesa fenomeno, tamen, ol averaĝa participo-kvoto (kaj eventualaj argumentoj pri stilaj "korekteco" kaj "pureco" ĉe individuaj eminentuloj de la Esperanto-movado), restas la abundo de adjektivaj participoj kompare kun substantivaj kaj adverbaj. El la 32 ekzemploj, plene 26 estas adjektivaj (81%). Kaj pri la 26 adjektivaj participoj validas jena divido:

aktiva, preterita participo (inta)	0
aktiva, prezenca participo (anta)	5
aktiva, futura participo (onta)	0
pasiva, preterita participo (ita)	14
pasiva, prezenca participo (ata)	5
pasiva, futura participo (ota)	2

Nekontesteble pli oftas pasivaj participoj ol aktivaj, kaj el la pasivaj superregas la preterita formo. Laŭ la nuna, ja liliputa enketo, oni konstatas, ke el ĉiuj 32 participoj plene 44% *ita*-forme prezentiĝas.

Ĝis nun la statistiko rilatis nur al prelegoj: hibrido ie kuŝanta inter libera, konversacia kaj pli malpli polurita, skriba esprim-manieroj. Malfacile estas analizi Esperanto-konversaciojn pro ĝenerala manko de taŭge registrita materialo (pro tio mi pledas en peidnoto 4 por pli rigora, scienca esploro, al kiu disponeblas rimedoj tempaj, teknikaj kaj financaj), tamen eventuala deirpunkto estas la *Songazetoj* de LF-Koop, kiuj entenas, se ne konversaciojn, do intervjuojn.

Pli alirebla, kaj fruktodona komparo-kampo liveras, memevidente, literaturon. Por iomete testi la hipotezojn pri ofteco kaj de participoj kaj de la *ita*-fenomeno, hazarde elektiĝis de sur la bretaro romano: *Ombro sur interna pejzaĝo de* Spomenka Štimec. Kaj, sur paĝoj 43-4, denove hazarde elektitaj, oni trovas ene de (nur) 200 vortoj jenon:

vort-numero	*participo*	*vort-numero*	*participo*
24	nepagipovantoj	159	reveninte
44	ornamitaj	171	surtabligota
64	akcentita	199	fuŝita
92	primokante		

Kvankam la unuaj, prelegaj konkludoj baziĝis sur tempaj, ne vortkvantaj kalkuloj, estas klare, ke pli oftas participoj en la skriba formo

ol en la parola, almenaŭ la prelega. Se supoziĝas, ke parolante oni elbuŝigas 140 vortojn/minute, tuj rimarkeblas, ke la participo-kvoto en la Štimec-ekzemplo superas je kvociento de 4/5 eĉ tiun de Marjorie Boulton en ŝia prelego. Konstateblas ene de 200 vortoj (do en parola formo ĉ. 90 sekundoj) sep participoj, kvar adjektivaj (tri *ita*-formaj), du adverbaj kaj unu substantiva.

Mankas kompleksaj verboj, samtempe interesa estas la sufiĉe ofta uzado de adverbaj participoj. Sugestitas (kvankam mi nenion scias pri participa uzado en la gepatra lingvo de Štimec), ke en pripensita, literatura medio oni sin turnas al formo nekongrua kun baze natura, nacilingva tendenco, la t.n. profunda lingvostrukturo (vidu supre pri nacilingvaj influoj sur participa (ne)uzado en la angla, franca, germana). Leviĝas la demando, ĉu en parola formo la verkinto dirintus, anstataŭ ". . . vagi tra varoj, *primokante* ilin," eventuale "dum mi ilin *primokas."* Same: anstataŭ *"Reveninte al* la sekuro de la hejmo. . . " eventuale "Kiam mi *revenis* . . . ktp." Restas esplor-ebla kaj -inda la vasta kampo de adverbaj participoj: tie ĉi eblas plugi nur flankan sulketon.


Tamen oni emas konkludi (surbaze de ja et-eta literaturotesto), ke pli malpli konfirmiĝas la hipotezoj pri kiomeco kaj pri kiaeco de adjektivaj participoj. Evdente substrekindas ke, antaŭ ol eltiri el la esploroj firmajn konkludojn, nepras rigoraj, vastaj, sciencaj enketoj. La nuna eseo estu rigardata kiel speco de palpilo lingvistika.

Se akcepteblas, tamen, la iom krudaj rezultoj, oni povas, ja devas reveni al la starto de la pedagogia hurdokurado. Ĉar plej verŝajne tiu altalta, timiga participo-hurdo ekzistas nur en la mensoj de instruistoj kaj de studantoj. . . aŭ, se ĝi ankoraŭ ekzistas, eblas ĝin malaltigi ĝis ĉiu elegante, gazele ĝin transsaltas. Alivorte: la rezultoj de la nuna enketo instigu al eventuala retaksado de metodiko pri instruado de participoj.

Kiel? Laŭ la nuna stato de Esperanta pedagogio, verkintoj de lernolibroj enkondukas participojn kunlige kun kompleksaj verboj. Studantoj devas alfronti ne nur participojn sed ankaŭ diversajn tempo-nuancojn. Konfuziĝas la lernantoj, des pli kiam la instruistoj sin apogas sur zamenhofa konsilo pri zorga, malofta uzado de kunmetitaj verbformoj. Sed enkonduko de participoj kune kun kompleksaj verboj ne nur malspegulas, lezas realan lingvo-uzadon sed ankaŭ plene nebuligas la participan fenomenon.

Ĉu ne pli saĝe argumenti: kompleksaj verboj, pro diversaj kialoj, apenaŭ ludas rolon. Aliflanke, la *ita*-participo sufiĉe oftas kaj sendube lernantoj baldaŭ renkontos ĝin. Do, anstataŭ enkonduki participojn

surdorse de neofta, apenaŭ bezonata fenomeno (kompleksaj verboj), ni, la instruistoj, participojn rekte enkondukos, komencante per la formo la plej ofta, nome la ita-formo. Sekve tipa, enkonduka ekzerco, ĉu parola, ĉu



La lernolibro *Tendaraj tagoj* sekvas la konsilon de la apuda artikolo.

Ĉapitro 63 pri la Pasporta Servo prezentas: vizitanto, loĝanto, fumanto, vojaĝanto, gastiganto kaj prezidanto, kiuj ja estas naturaj en tiu kunteksto.

Ĉapitro 77 pri la spiono 005 same nature, kaj en instiga rakonto, ekuzas la *ita*-formon en la adjektivaj sencoj: ŝlosita, fermita, perdita, ligita, plenumita...



Nur fine en ĉapitro 87 pri Ne-Identigitaj Flugantaj Objektoj (NIFO-j), la lernanto fine renkontiĝas kun la kompleksaj tempoj, unue kun la aktivaj (v. la bildojn de Pavel Rak), kaj poste en ĉapitro 89 kun la pasivaj formoj.

skriba, tekstus:

Instruisto: Mi faris la laboron.
Lernanto: La laboro estas farita.
Instruisto: Mi skribis la leteron.
Lernanto: La letero estas skribita.

Substrekindas, ke tie ĉi, kvankam kunmetita verbo, estu emfazata la adjektiva kvalito de la participo kaj ne la tempa kvalito de la verbo. Tiel la lernanto kutimiĝu al la preterita, participa formo sen ĝeno pri tempoj, verboj, k.s. La participo estu konsiderata unue kiel adjektivo, ne kiel subspeco de verbo. Montriĝas du avantaĝoj: malpli da konfuzo flanke de lernantoj; pli da realismo kadre de lingvo-lernado/uzado. Poste, post sukcesa apliko de la *ita*-formo, oni sin turnu al aliaj participoj: unue *ata,* tiam *anta* ktp. Tiam, sukcesinte pri adjektivaj formoj, la lernanto okupiĝu pri la adverba formo, kaj nur finfine pri la tuta gamo de kunmetitaj verboj. Tiel naniĝos tiu terura, giganta participo-hurdo, kiu komence de la eseo tiel identiĝis.

Evidente, la supraj konkludoj restu provizoraj. Bezonatas multe da laboro, multe da pacienco: Daniel Moirand dediĉis tutan libron al la akuzativo en Esperanto,[5] kaj sendube nur diplomverke, libroforme oni povus prilumi ĉiujn diversajn kaj multfacetajn aspektojn de la Esperanta participo. Se tiu ĉi povra eseo instigos pli klerajn homojn al funda, rigora esploro, kontentiĝos.

Paul P. Gubbins, Congleton, Britio, 94-08-30

Ĉi tiu verko estis unu el la minoraj eseoj prezentitaj por la brita licencia ekzameno, kiu postulas tri minorajn kaj tri maĵorajn eseojn.

Notoj

1. L.L.Zamenhof. *Lingvaj Respondoj* (Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1962, sesa eldono), n-ro 108, p.90.
2. K.Kalocsay, G.Waringhien. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Rotterdam: UEA, 1985), p.135.
3. F.Faulhaber. *Ne tiel, sed tiel ĉi!* (Aabyhoj: Dansk Esperanto Forlag, 1970), p.41.
4. Vere scienca esploro pri uzado (aŭ ne-uzado) de participoj restas eksterkadre de tiu ĉi eseo. Aktuale mankas al la verkinto tempo kaj rimedoj ekzemple por surpaperigi kaj statistike, matematike, profunde analizi la prelegerojn, sur kiuj baziĝas la konkludoj. La eseo estu rigardata kiel provo, kiu iam instigos al pli rigora reserĉo eventuale kadre de universitata diplomverko. Mi tiurilate kaptu la okazon gratuli kaj docentaron kaj studentojn ĉe universitato Eotvos, Hungario, pri kies valoraj esploroj oni raportas en *Internacia Pedagogia Revuo*. Al ili forto kaj emo pli enketi!
5. D. Moirand. *Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo* (Antverpeno: FEL, 1990).

PEDAGOGIA KALENDARO

Intensa metodika kurso

La Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo de Karlskoga, Svedio okazigos 4-monatan intensan Esperanto-kurson 9 jan-19 majo 1995. 24 studhorojn semajne inkl. lingvolaboratoriajn. Instruado, de la vera komenco, tute en Esperanto.

Celgrupo: Komencantoj en Esperanto, ekz. lingvostudontoj ĉe universitato, instruistoj pri lingvoj kaj kompreneble ĉiuj komencantoj, kiuj intense volas lerni Esperanton. La kurso celas konatigi Esperanton al lingvoinstruistoj kaj ebligi al studantoj pli efike lerni aliajn lingvojn. Eksterlandanoj bonvenaj. La kurso finiĝos per ekzameno.

La studantoj loĝas en modernaj, unulitaj ĉambroj kun propra duŝo kaj necesejo kun komuna kuirejeto kaj televida ĉambro. Ĉiuj manĝas kune en la lerneja manĝejo. Oni rajtas kromelekti studfakojn kiel ceramikon, teksadon, komputadon ktp. Estas eble uzi la sporthalon kaj foto- kaj bilard-ĉambrojn. La lernejo situas apud lago en alloga naturo unu km. sude de la urbo Karlskoga.

Ekde 1988 la Esperanto-fako okazigas 8-semajnajn aŭ tutsemestrajn kursojn kaj ekde 1987 internaciajn somerajn kursojn. Ekde 1993 la Eŭropo-kurso tutjara uzas Esperanton kiel propedeŭtikan studfakon por studado de la franca kaj germana. Jam partoprenis studantoj el pli ol 30 landoj.

Kostoj: Kvarmonata kurso kun studoj, loĝado, manĝado (sen vesperaj kaj semajnfinaj manĝoj) 10800 SEK Lernolibroj (sen vortaroj) ĉ..500 SEK

Adreso: Karlskoga Popola Altlernejo, S-691 24 Karlskoga, Svedio. Telefono (0586) 503 60; fakso (0586) 370 77.

Marto 24-26 (vend.-dim.)

Instensa kurso pri komunika instruado, kun praktika gvido en la uzado de la tria kajero de *Tendaraj tagoj*. Kiel organizi rol-ludojn kaj paroligi lernantojn. En klubejo *Esperejo* en Budapeŝto, gvidota de S. MacGill. Organizos: ILEI kaj HEJ. **Kursokosto:** 800 HUF por hungaroj kaj reform-eŭropanoj, 25 DEM por aliaj (999 kaj 35 kun la libro). Ni proponos loĝigon en komunaj gastejoj (ĉ. 500HUF aŭ 15DEM nokte) aŭ en pensionoj (2500HUF aŭ 40DEM). **Loĝiga antaŭpago:** 800HUF aŭ 25DEM. Pagoj al la konto *heja-b* ĉe UEA, aŭ en Hungario al la konto de MIESZ ĉe MHB, 6-os fiok, n-ro 315-10976. Petu pagilon kaj pli da informoj de: HEJ, Erika Tóth, Kinizsi u. 6, HU-2360 Gyál, Hungario.

Aprilo 14- 21

11a Printempa Semajno Internacia (PSI). Familia kunveno organizita de GEA en Waldfischbach *(valtfiŝbaĥ)*, Palatinato, Germanio. Apartaj programoj por infanoj. Kotizoj de 120 ĝis 430 DEM. Petu aliĝilon de W. Bohr, Johannes-Kirschweg 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler.

Julio 22-29

80a Universala Kongreso de Esperanto en Tampereo, Finnlando, kune kun Infana Kongreseto por 6–13-jaruloj. Informoj: UEA, Nieuwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Roterdamo, Nederlando.

Julio 29 - Aŭgusto 4

29a Konferenco de ILEI en Övik kaj la 3a Gimnazio de ILEI. Vidu la informilon kaj aliĝilon apude. Aliĝu baldaŭ ĉar dormlokoj estas limigitaj!

Aŭgusto 10-16

Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF), Tatabanya, Hungario. Informoj per ILEI, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario.

29a Konferenco de ILEI:
Övik, Finnlando
29 julio (sabato) ĝis 4 aŭg. (vendredo) 1995

Aliĝadreso: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24 294 HÖRBY, Svedio

La loko: Övik, modesta konferencejo, en la proksimeco de la finna urbo Porvoo/Borgå ĉe la suda marbordo.
La distanco inter Tampereo kaj Porvoo estas 192 km. Ni aranĝos komunan aŭtobusan vojaĝon de la UK al nia ILEI-konferenco. Bonvolu antaŭmendi provizore. Ekzistas fervojaj vojaĝeblecoj. Porvoo situas proksimume 50 km. oriente de Helsinki.

La konferencejo: Modesta, sed bele situanta ejo ĉe la maro. La nombro de litoj estas limigita. Se vi malfrue aliĝas vi riskas ke ne estas loko por vi. La konferencejo disponas pri:

- salono (kune kun la manĝejo) kaj grupĉambroj
- modernaj aŭdvidaj helpiloj
- 2-, 3- kaj 4-litaj ĉambroj en du domoj
- apartaj necesejoj kaj duŝejoj
- propra banstrando
- minigolf-ludejo
- saŭno (kontraŭ kroma pago)



Kotizoj: La prezoj inkluzivas:

- 6 tranoktojn
- matenmanĝon kaj du manĝojn tage
- kafon + bulkon posttagmeze, teon kun pano vespere
- la konferencan programon (ekskurso aparte pagenda)

	NLG	*SEK*	*FIM*	*HUF **
4-lita ĉambro	340	1460	925	15.000
3-lita ĉambro	350	1500	955	19.000
2-lita ĉambro	360	1550	985	21.000
1-lita ĉambro	370	1600	1020	24.000
tendumanto	230	1000	640	11.000

* Tiuj prezoj nur por limigita nombro de loĝantoj de Hungario aŭ tiuregionaj landoj, post interkonsento.

Eblas tendumi por tiuj, kiuj mem kunportas tendon. Bonvolu kontakti Bertil Andreasson por informoj antaŭ aliĝo. La tenduma prezo inkluzivas ĉion krom la ĉambra loĝado. Necesejoj kaj duŝejoj troviĝas en la saŭno.

Pri parta partopreno aŭ aliaj aranĝoj koncerne tranoktadon ktp, bonvolu kontakti Bertil Andreasson.

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:

a:) al nia UEA-konto: *ilek-a*, indikante *ILEI-konf. 95*. (Pĝk.de UEA: 37 89 64).
b:) al poŝtĝirkonto nro 682117-7, ILEI, Södra Rörum pl 455, S-242 94 Hörby, Svedio
c:) per via banko al la sama adreso. Bv. aldoni 10 guldenojn por bankkostoj.
ĉ:) aliĝontoj el netranspagipovaj landoj bv. kontakti Bertil Andreasson por informoj. Hungaroj povos pagi forinte al la hungara ILEI-sekcio; petu pagilon.

Pliaj informoj: IPR kontinue informos pri la konferenco en la venontaj numeroj. Aliĝintoj ricevos pli detalajn informojn pri la programo, praktikaj aferoj ktp.

Temo: *La propedeŭtika valoro de Esperanto.* Kiel kaj kial lernado de Esperanto faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Gimnazio: Kadre de la Konferenco okazos la 3a Gimnazio de ILEI, internacia somera stud-semajno por 13–16-jaruloj.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 29a Konferenco de ILEI en Övik, Finnlando de 29 julio — 4 aŭgusto 1995.

Familia nomo._____ Antaŭnomo_____

Profesio:_____Naskiĝdato:_____Sekso:____

Adreso:_____

Poŝta kodo_____Loĝloko:_____Lando:_____

Subskribo_____Dato:_____

Bonvolu krucsigni:
Mi mendas ĉambron unulitan ❑; dulitan ❑; trilitan ❑; kvarlitan ❑.

Mi deziras tendumi. Bv. doni aldonajn informojn.

Mi deziras loĝi kun _____ kiu ankaŭ aliĝas

Mi manĝas vegetare: jes ❑ ne ❑

Mi sekvas jenan dieton: _____

Aliaj deziroj:_____

Mi povos kontribui al la programo per: _____

_____

Mi provizore mendas vojaĝon aŭtobusan Tampereo —Övik: ❑

La kotizon de._____ mi pagis je dato_____

per maniero **a.**❑ **b.** ❑ **c.** ❑ **ĉ.** ❑

Mi planas partopreni en la UK en Tampereo: jes ❑ ne ❑

❑ Bv. sendi al mi informojn pri la paralele okazonta 3a Gimnazio.

Spaco rezervita al LKK

La aliĝilo alvenis je:_____ Aliĝnumero:_____

La pago alvenis je:_____ Sumo:_____

Ankoraŭ pagendas:_____

Ĉambronumero:_____ Kun _____

MENDILO de la ILEI-libroservo

Se vi aliĝas al la ILEI-konferenco, sendu la mendilon al s-ro Andreasson, se ne sendu ĝin al ILEI, pf. 193, H-1368 Budapest. La forintaj prezoj validas nur por loĝantoj de Hungario kaj reform-eŭropo (pagu al hungara ILEI-sekcio)

	kvanto	*sumo*
Tendaraj tagoj, kajero 1, po 12 NLG, 50 SEK, 110 HUF:	.....	.....
Tendaraj tagoj, kajero 2, po 15 NLG, 60 SEK, 140 HUF:	.....	.....
Tendaraj tagoj, kajero 3, po 18 NLG, 75 SEK, 250 HUF:	.....	.....
Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado de Mag. I. Szanser, 24 NLG, 96 SEK, 600 HUF	.....	.....

Por la supraj verkoj validas triona rabato ekde 3ekz. de Teorio kaj..., *ekde 5 por Tendaraj tagoj I kaj 2 kaj ekde 4 ekz. por la tria kajero de TT. Prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn. Pli grandaj rabatoj por mendoj ekde 12 ekz. Vidu JA 94/1.*

Abono *Juna amiko* 1995 laŭ tarifo 1: 16 NLG, 60 SEK ....

Abonoj varias laŭ kvin tarifoj por varia pagipovo. Petu plenajn informojn aŭ vidu JA 94/3 por detaloj.

Kombi-pako kun 8 n-roj de *Juna amiko*, 16 NLG, 60 SEK ....

La ok revuoj estos la jarkolektoj 1992 kaj 1993, plus fotokopie pretigitaj labor-folio kun bildstrio La testudoj *kun ekzercoj, tri-paĝa prezento* Tendaraj agoj *el JA94/3 en A4-formato kaj la baza 960-vorta vort-listo laŭ kiu ni verkas por la revuo.*

SUMO ....

❑ Mi antaŭpagas la mendon al B. Andreasson (pĝk. 147429-5, adreso p. 2)
❑ Mi antaŭpagas la mendon al la konto *ilek-a* ĉe UEA.
❑ Mi aldonas internaciajn respondkuponojn (1 irkp = 1 NLG)
❑ Bv. sendi al mi fakturon, laŭ kiu mi pagos ene de 30 tagoj.

Nomo:..... Adreso:.....

.....

Subskribo:..... Loko: ..... Dato:.....

La nova 275-paĝa lernolibro de Paŭlo Gubbins Kunvojaĝu *estas mendebla de Edistudio aŭ UEA je 30 NLG. Ni prezentos ĝin kaj aliajn novajn lernolibrojn detale en la venonta IPR. ILEI rajtas vendi ĝin nur al hungaroj kaj en reform-eŭropo, (je 900 HUF.)*

RAPORTO PRI ENKONDUKO DE LA I.L-O EN ITALAN BAZAN LERNEJON

Komence de la jaro 1990-a, paro da instruistoj de la ŝtata elementa lernejo "Gaetano Salvemini" vizitis la unuan lecionon de baza kurso de la Internacia Lingvo (I.L-o). Ili ambaŭ ĉeestis pro simpla scivolemo ĉar ili tute ne supozis, ke Esperanto estas iel utila lingvo por ion fari. Pri tiu lingvo ili havis la samajn antaŭjuĝojn, kiujn havas multe da tiel nomataj aŭ ... sindirantaj ... "kleruloj". Fine de la leciono, ili miregis, ĉar en 90 minutoj ili estis lernintaj pri la I.L-o multe pli ol tio, kio estas lernebla pri la franca en 90 tagoj. Ili ambaŭ scipovas la francan, lerninte ĝin kaj uzante ĝin somertempe dum siaj ferioj.

Forlasinte siajn dubojn pri la kontrolota taŭgeco de la I.L-o por interkomuniki en la realo, Carlo *(pron.: Karlo)* kaj Maria Teresa *(pron.: Tereza)* Bourlot vizitadis la tutan kurson, skribis kelkajn simplajn leterojn en Esperanto al eksterlandanoj, ricevis iliajn respondojn kaj, kompreneble, sukcesis la unuagradan ekzamenon junie de 1990, laborinte serioze sed tute ne streĉe.

Tiutempe la instruado de fremdaj lingvoj estis enkondukota en la italajn elementajn (bazajn) lernejojn pro la ĵusa validiĝo de novaj programoj; al la itala *Scuola Elementare* iradas la geinfanoj, ekde.la 6a:jaraĝo dum kvin lernojaroj. La sesjaraĝuloj eniras en la t.n. Unuan Klason *(Prima Classe)* kaj la dekunu-jaruloj eliras el la t.n. Kvina Klaso *(Quinta Classe)*; la instruado de fremda lingvo estis enkondukota (laŭleĝe) ekde la dua aŭ la tria klasoj, post taŭga trejnado de la instruistoj fare de la instancoj de la Ministerio por la Publika Instruado (= M.P.I.), kiu, ĝuste tiam, estis plananta tiun trejnadon.

Ne atendante tiun trejnadon (kiun li taksis nenecesa por si mem, ĉar li jam antaŭlonge instruis la francan kaj bone scipovas ĝin) Carlo estis enkondukinta la instruadon de la franca al tri Triaj Klasoj (8-jaraj geinfanoj) ekde oktobro 1989; kompreneble; li estis ricevinta la specifan aprobon de la gepatroj de la lernantoj kaj de la Lernejestro.

Tiu instruado daŭris entute tri lernojarojn: ekde oktobro 1989-a ĝis julio 1992-a. Post mallonga skriba korespondado, aprilon de 1992, akompanate de Carlo kaj de alia instruistino, dudeko da gelernantoj vizitis dum unu semajno klason da samaĝaj francoj en Burgonjo; la sekvan majon, akompanite de sia instruistino, dudeko da etaj burgonjanoj vizitis dum unu semajno la lernejon *Salvemini* en Torino. Dum ambaŭ

vizitoj, la infanoj gastis ĉe la familioj de siaj korespondantoj kaj kune vojaĝis tra Burgonjo kaj Piemonto, kiuj estas iom similaj regionoj, plenaj je naturaj belaĵoj, je homa laboro, je historio.

La tuta afero estis simpatia, interesa, sukcesa kaj memorinda. Tamen, en ĝi ankaŭ estis io nesimetria, kio ebligis rigore kontroli, kiom la etaj torinanoj lernis la francan: la etaj burgonjanoj nur lernis ion pri la itala dum kelke da horoj, do ili apenaŭ konis kelkajn ŝablonajn dirmanierojn. Plie: Piemonto samlimas kun Francio kaj partoj de ĝi eĉ apartenis al la Franca Regno plurajn jarojn. Burgonjo, male, situas en centra regiono de Francio; do, en preskaŭ ĉiu torina familio estas iu, kiu iom lernis la francan; male, en neniu el la burgonjaj familioj gastigantaj la etajn torinanojn estis iu, kiu iom scipovas la italan.

Pro tio, kiam la italaj gastetoj deziris ion demandi, peti aŭ komunuki, ili nepre estis devigataj uzi la francan lingvon aŭ ion similan. La instruisto rimarkis ke:

❶ la averaĝa scipovo de la franca estas malpli bona ol supozite;

❷ la grado de la individua komunik-kapablo dependas pli de sentima persona karaktero, ol de la lerneje akirita scipovo de la lingvo;

❸ la plej ĝenataj infanoj estas ĉiuj bonaj lernantoj, kiuj lerneje bone sukcesis: inteligentaj homoj diligente laborantaj.

Estas evidente, ke tiaj konstatoj ne estis entuziasmigaj; malgranda konsolo estis, ke la etaj burgonjanoj trovus en Torino pli da problemoj ol trovis la etaj torinanoj en Burgonjo, se la franca estus tiom obskura lingvo en Piemonto, kiom la itala estas en Burgonjo. Restis la problemo pli efike instrui la francan al la venonta klaso (En Italio la instruistoj kutime "akompanas" la samajn infanojn ekde la Unua Klaso ĝis la Kvina). Tio estis problemo de Carlo en junio de 1992.

Dum la tri lernojaroj, kiam li instruis la francan al sesdeko da gelernantoj tre ofte la instruisto deziregis, ke la instruenda lingvo estu pli simpla, kohera, nu... artefarita, sen insidoj kaj stumbligiloj por infanoj — estus ege pli facila laboro por la instruisto kaj pli ĝojiga sperto por la lernantetoj, alfronti, kiel unuan fremdan lingvon, Esperanton anstataŭ iu ajn alia.

Tamen, eĉ simpla aludo al tia hipotezo, ŝajnis iom riska afero; la instruisto plene konsciis, ke multe da honestaj homoj estos tute malfavoraj al tiom ekstravaganca propono: li mem antaŭnelonge estintus

tute malfavora al la ideo enkonduki Esperanton en devigan lernejon, antaŭnelonge li estus demandinta: **–Kial? –Kiucele?-** kaj tiam neniun respondon li trovus konvinka, ĉar senkonscie oni ofte bazas siajn principajn juĝojn sur antaŭjuĝoj; tio estas certe bedaŭrinda sed ankaŭ tute normala kaj siajn antaŭjuĝojn oni devas senmaskigi mem. Tamen, ju pli li pripensis la problemon, des pli li ŝatis la ideon instrui la I.L-on kiel unuan fremdan lingvon al siaj estontaj lernantetoj. Li jam estis trovinta kelke da respondoj al la demandoj "Kial? Kiucele?".

KIAL li pensis, ke E-o estus enkondukinda en bazan lernejon?

① Car la interna strukturo de Esperanto ŝajnis al li "tute konforma kun" la normala grado de la mensaj kapabloj de 7-8-9-jaraj infanoj, ŝajnis al Carlo, ke Esperanto estas "instruebla" al tiomaĝaj lernantoj.

RIM. **a:** Ne ĉio "lernebla" ankaŭ estas "instruebla". Kompreneble, ĉiu lingvo estas lernebla de infano per tute natura procezo, kiam li vivas en alilingva aŭ plurlingva medio; lernejo ne estas tia medio.

b: Li neniel intencis aserti, ke aliaj fremdaj lingvoj ne estas instrueblaj al la infanoj; tiutempe li nur eksupozis, ke la tuta laboro (kaj de la docento kaj de la lernantoj estus pli glata se oni instruus unue E-on.

② Car, pro la tipaj ecoj fonetikaj kaj alfabetaj de E-o, tute eblus ekde la komenco samtempe enkonduki kaj la parolatan kaj la skriban lingvon, kio estas malrekomendinda agado se la instruota lingvo estas nacia lingvo kaj se la lernantoj estas infanoj.

RIM. **a:** Ĉiuj fakuloj pri didaktiko de fremdaj lingvoj konsilas komenci parolante kaj paroligante la infanojn: skribi fremdlingve estus afero tro komplika por tiuj, kiuj apenaŭ kapablas skrib(aĉ)i en la gepatra lingvo.

b: Frua skribpovo de fremda lingvo ebligas fruan korespondadon kun eksterlandanoj. Korespondado estas vera komunikiĝo, kio ja estas la precipa celo (tre forta eĉ se iam nekonscia en la infanoj) de tia instru/lern-ado. Frua korespondado en alinacia lingvo estas neeblaĵo por infanoj, do...

KIUCELE enkonduki E-on anstataŭ (aŭ almenaŭ antaŭ) iu ajn alia fremda lingvo?

① Por ne senentuziasmigi la lernantojn (la etajn lernantojn...)

RIM. La instruistoj spertas, ke la lernantetoj, komence entuziasmaj fronte al la perspektivon lerni novan lingvon (rilate tion ĉi la atendoj de la familioj ludas gravan rolon), perdas survoje grandparton da intereso.

② Por vivteni kaj pligrandigi la originan intereson.

RIM. **a:** Novan lingvon oni lernas por komuniki kun iu, kiu ne komprenas onian lingvon, evidente! Sed, kutime, la ebleco vere paroli kun tiaj homoj ne estas realigebla en mallonga aŭ mezlonga periodo: tiaj interparolantoj ne estas tiom oftaj tie, kie la lernanto vivas; pere de E-o oni frue povo-scius sufiĉe da skriba lingvo por persone skribi al eksterlandanoj, kiuj alimaniere (vidalvide, telefone.. ?) ne estus atingeblaj. Tiel la utileco de la I.L-o (kaj de la farata laboro) okulfrape evidentiĝus.

b: Pere de E-o oni povas malmultekoste havigi al si multegon da diversaj informoj, ekscioj; ricevinte bazan instruadon pri E-o, grupoj da infanoj eĉ kapablus... kontroli mem kelkajn informojn dissenditajn de la amaskomunikiloj. Imagu: infano kontrolus mem la verecon de informoj! Estas multe da plenkreskuloj, kiuj eĉ ne supozas tion ebla.

c: La vortfarado esperanta permesas al lerta komencanto eltrovi mem multajn novajn vortojn: tio devus esti ĉarma sperto por la infanoj, kiuj ŝategas eltrovi mem novajojn. Tiu aparta eco de E-o ankaŭ prokrastus la neceson uzi vortarojn fare de la nespertaj (antaŭnelonge analfabetaj) infanoj.

KIAM oni devus enkonduki la I.L-on en bazan instruadon?

Laŭ la itala reglamentado, oni devas enkonduki la instruadon de la fremda lingvo almenaŭ ekde la 3-a klaso; kompreneble kondiĉe ke ĉeestas instruisto kapabla kaj rajtigita instrui iun fremdan lingvon. Ofte tiu instruado komenciĝas en la dua klaso, malofte eĉ dum la unua. Carlo estis rajtigita instrui la francan kaj li pensis enkonduki ĝin en la venontan trian klason aŭ, eble, dum la dua; li ne trovis oportune enkonduki ĝin pli frue, kiam la infanoj lernas legi kaj skribi sialingve.

Tamen, se la instruota fremda lingvo estas Esperanto, verŝajne oni povus enkonduki ĝin ekde la komenco de la dua klaso ĉar la tute racia kaj aparta strukturo de la I.L-o ne devus tro ĝeni infanojn, kiuj apenaŭ (iom) lernis legi kaj skribi en la gepatra lingvo.

KIOM da tempo oni dediĉu al la instruado de Esperanto?

La italaj normoj konsilas, ke oni instruu la fremdan lingvon po tri horoj semajne. Tiu tempo-kvanto plene sufiĉus por E-instruado.

Carlo sciis, ke tiuj pripensadoj estis nur revoj, ĉar la nuda realo estas, ke li nepre instruos la francan al siaj venontaj gelernantoj. Kiam li vizitis la kurson por la instruado de la franca en la elementaj lernejoj, li ankaŭ certigis per sia subskribo, ke li instruos la francan almenaŭ al la propra klaso. Fakte, la Ŝtato elspezas monon celante la instruadon aŭ de la

angla, aŭ de la franca, aŭ de la germana, aŭ de la hispana..., certe ĝi ne intencas financi per la ŝtattrezoro oniajn revojn (povas esti, ke tio okazas, sed ne laŭleĝe...).

La lerneja leĝaro de Italio (D.P.R. 419/74, artikolojn 2 kaj 3) permesus proponi (art. 3) kaj eĉ decidi (art.2) eksperimentadojn; fakte, li deĵoris en. tiu lernejo de dudeko da jaroj do, li estas sufiĉe aŭtoritata kolego, por ke la instruistaro akceptu lian proponon, kiu nur koncernos lin mem. Sed poste, kiel li povus konvinki la konsternitajn gepatrojn, ke por iliaj filetoj estas preferinde lerni E-on anstataŭ "vera" fremda lingvo; nu, kiel? Li mem antaŭnelonge... Kaj finfine li vere ŝatas la francan, somerumas en Francio, li ne nur devas nepre instrui tiun lingvon, li ankaŭ volas bone instrui ĝin. Nu: senelirejo!? Aŭ ne?

Elirejon li trovis iun tagon tralegante la gazeton *Heroldo* — estis informoj pri nova verko (ĉu de E. Symoens, ĉu de H. Frank?).. pri la propedeŭtika valoro de Esperanto... Tiuj vortoj – *propedeŭtika valoro* – ŝaltis ion en lia cerbo. Li atente legis la tutan artikolon, li estis eltrovanta la jam eltrovitan Amerikon; italoj dirus, ke li eltrovis la varman akvon. Tiu valoro de la I.L-o estis de longa tempo bone konata en Esperantujo sed li ankoraŭ ignoris preskaŭ ĉion pri tiu "lando" *(Patro, pardonu lin, ĉar li ne sciis, kion li faris. - Luko: XXIII, 34)*. Ĉiuokaze, la kerna problemo estis solvita. Kiel enkonduki Esperanton kaj kiamaniere konvinki la gepatrojn de la venontaj lernantoj?

Oni ellaboru eksperimentan planon (laŭ artikolo 3 aŭ 2), aprobigu ĝin de la lernejaj konsilioj kaj transigu ĉion al la instancoj, kiuj povas rajtigi la eksperimentadojn. Se estas verŝajne, ke la I.L-o estas taŭga ilo por pli bone lernigi fremdajn naciajn lingvojn, se la instruisto, kiu instruos mem la francan aŭ la anglan, prezentas planon por pli efike ilin instrui prenante sur sin la respondecon rilate la finajn rezultojn... kiu do inter la gepatroj kuraĝos malkonsenti? Ankaŭ estis memorinde, ke oni prezentos la projekton al la gepatroj junion aŭ septembron de la 1993-a (ni ankoraŭ estas en junio de la 1992-a), fine de la Unua Klaso, kiam la gepatroj jam fidas la instruistojn, kontrolinte, ke siaj filetoj pluvivas kaj volonte vizitas la lernejon.

Verŝajne, ĉio kongruis teorie, li pridiskutis la tutan hipotezon kun kelkaj gekolegoj, kun la Lernejestrino kaj trovis ĉe ili intereson kaj favoron, des pli, ke li estis (ŝajne) la ununura koncernoto; sed, ekde tiam

"li" aliiĝis en "oni"-n, kio estas pli taŭga subjekto. La difinita tempo-limo por transigi eksperimentajn projektojn falas septembre, do restis la tuta somero por ellabori kompletan skriban planon. Dum la lasta kunsido de la instruistaro antaŭ la ferioj oni parole skizis la ideon, proponante por la venonta lernojaro bazan kurson de E-o por la eventuale interesiĝintaj gekolegoj; tiun kurson povos inkludi la jara kleriga programo, kiun (devige) la konsilio de la docentoj de la lernejo aprobas ĉiun septembron.

Atente aŭdinte ambaŭ proponojn, la asembleo (*Collegio dei.Docenti* = Asembleo de la Docentoj) konsideris ilin interesaj, prokrastis ĝis septembro la aprobon de skribe difinota plano kaj disiĝis por somerumi.

LERNOJARO SEPT. 1992 – AŬGUSTO 1993-A

Septembron 1992-an la eksperimenta projekto estis preta. La teksto estis pridiskutata de la Asembleo kaj de la Konsilio de Instituto (*Consiglio di Circolo*; akronime C.D.D. kaj C.D.C.), kiuj ambaŭ aprobis ĝin per voĉdonadoj preskaŭ unuanimaj (nur unu-du sindetenoj kaj neniu *ne*).

Oni transigis la planon al la instancoj, kiuj povas rajtigi la eksperimentadon; oni sinadresis al TEC (Torina Esperanto-Centro) por starigi E-kurson por instruistoj. Ekde januaro ĝis majo la interesitaj instruistoj frekventas bazan E-kurson konsistantan el dudeko da 90-minutaj ĉiusemajnaj lecionoj. Trideko da kursanoj (inter ili ankaŭ la Lernejestrino) vizitis la tutan kurson; 19 el ili ekzameniĝis kaj, kompreneble, sukcesis, inkluzive de la Lernejestrino. La aliaj ne ekzameniĝis pro diversaj kaŭzoj: pro momenta nepovo aŭ eĉ pro malŝato je ekzameniĝo... -Kial do, mi, kvardek jaraĝa instruistino, devus ekzameniĝi?- Nu, pri gustoj oni ne disputu.

Vizitis la tutan kurson kaj sukcesis la ekzamenon tri instruistinoj, kiuj laboras en klasoj "paralelaj" (t.e. en klasoj najbaraj kaj samnivelaj) al tiu de la raportanto. Ĉar unu el ili ankaŭ estis i.a. instruisto de la franca kaj alia intencis fariĝi instruisto i.a. de la angla, la tuta lingvo-orientiga eksperimenta plano estis iom adaptota al nova, eĉ pli interesa situacio. en kiuj rolas Carlo BOURLOT, Emilia DESTEFANIS kaj Laura SPERANZA).

SOMERO DE 1993-A

Tri instruistoj de la Lernejo G. SALVEMINI (S-ino Emilia DESTEFANIS, S-ino Maria RESTA kaj Carlo BOURLOT) frekventis en julio semajnan kurson pri "LingvOrientiga Instruado " = "L.O.I." gvidatan de Profesorino Elisabetta VILISICS FORMAGGIO, kiu ankaŭ estas la aŭtoro de 150-paĝa bela E-instrulibro por infanoj *LUDU KUN NI!* kaj de 40-paĝa broŝuro por E-instruistoj.

La kurso estis tre interesa kaj tuj evidentiĝis, ke tiu instrumaterialo estas ege taŭga por la laboro farota de la antaŭdiritaj instruistoj . Ili tuj ŝategis tiujn verkojn ĉar:

1-e) la libro por infanoj estas adekvata por 7–l0-jaraĝuloj;
2-e) la broŝuro akompanas la E-instruiston unu paŝon post la alia;
3-e) la divido/gradigo de la instrua programo kongruas kun la eksperimenta projekto
(RIM. la TRIAN GRADON oni povos fari dum la Kvara kaj Kvina Klasoj).

La someran kurson pri L.O.I. organizis Akademio Internacia de Sciencoj en Sanmarino kaj E.R.A. kaj I.E.F. (Itala Esperanto-Federacio) por bazlernejaj instruistoj, kiuj jam scipovas la Internacian Lingvon kaj ankaŭ jam estas rajtigitaj instrui alian fremdan lingvon. Bedaŭrinde tiaj instruistoj ŝajne estas raraj; krom la antaŭdirita trio el Torino, venis nur unu tia kolego: Luigia OBERRAUCH MADELLA el Parma (Regiono Emilia Romagna), kiu instruas la anglan en 8 klasoj (t.e. en du klasoj pli ol devige!) kaj baldaŭ emeritiĝos. Luigia ne intencas modifi sian laboron, ĉar ŝi ne povos respondeci pri la tuta eksperimentado.

Kompreneble, ĉeestis la kurson ankaŭ aliaj kolegoj, kiuj profitis la okazon lerni iom da Esperanto; tamen, neniel ili povus sufiĉe lerni pri ĝi por instrui la Internacian Lingvon al siaj klasoj; cetere, el ili neniu estis rajtigita instrui fremdan lingvon.

Por la sekva somero la organizantoj devos nepre programi tian kurson, kia enhavu; **1-e)** bazan kurson de Esperanto kun fina ILEI-ekzameno,
2-e) seminarion pri LingvOrientiga Instruado.
(Feliĉe, tia kurso hodiaŭ estas realaĵo: ĝi okazas de la 20-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1994: 9-taga baza E-kurso + 5 tagoj pri L.O.I.)

Partoprenante aŭguste en la Pineta Kongreso de I.E.F., ges-roj Bourlot serĉis kolegojn taŭgajn por lingvorientiga instruado; ili trovas neniun.

LERNOJARO 1993 / 1994-A

(ekde Septembro 1993 ĝis Aŭgusto 1994)

De la Ministerio neniu respondo venis al nia Lernejo pri la projekto transigita la antaŭan jaron, do oni enkonduku la LingvOrientigan Instruadon de la Internacia Lingvo en tri Duaj Klasoj surbaze de la aprobo de ĝi fare de la Asembleo de la instruistoj. (Art. 2 D.P.R. *419/74)*

Ne estas normale, ke la Ministerio nenion respondas pri eksperimenta plano laŭregule prezentita. Plie, tiu projekto ŝajnis sufiĉe bone strukturita kaj estis tre malmultekosta se ne diri senkosta kaj ĝi estis akirinta favoran juĝon de la fakaj instancoj provincnivela kaj regionnivela.

Plejverŝajna interpreto de tiel nekutima ministeria silento ŝajnas jena: la enkonduko de la instruado de fremda(j) lingvo(j) estis tiutempe tro ĵusa, por ke la plej alta priresponda instanco rajtigu novigajn eksperimentadojn pri ĝi; aliflanke tiu projekto estis nefacile malrajtigebla. Do: neniu respondo ... estus taŭga respondo.

Tamen... "Silento estas konsento", aŭ ne? Alia interpreto estas, ke la ministerio ne respondas, kiam ĝi ne rajtigas projekton. Nu, oni ne trovis tiasencan proverbon, ĉu ne? Do...

Septembron la Asembleo de la instruistoj re-prezentis iom ĝisdatigitan tekston de tiu plano aldonante ke:

1-e) dujara instruado de Esperanto celas pli efikan instruadon kaj de la franca kaj la angla (la unua teksto hipotezis nur la francan);

2-e) se oni ne ricevos aprobon de la Ministerio, la Lernejo proprigos al si la eksperimentan planon pri L.O.I. por la nuna lernojaro laŭ la art. 3 D.P.R. 419/74 ĉar ne estas devige instrui fremdan lingvon nacian en Duaj Klasoj (kio estas deviga ekde la Tria Klaso); do, la propedeŭtika E-instruado povas tiunivele esti konsiderata, kiel metodologia rimedo (ne kiel struktura modifo).

Ni (la aŭtoroj de ĉi tiu raporto) prezentis la plurjaran L.O.I.-projekton al la gepatroj de niaj lernantoj; ili (kiel antaŭvidite) bonvole akceptis la proponon kaj unuanime aprobas la planon. La Konsilio de la Instituto volonte aprobis la ĝisdatigitan tekston, kiu estas transigita al la superaj Instancoj. Fine de Septembro ni komencis instrui E-on al niaj tri Duaj Klasoj. Ni ne priskribos la didaktikan laboron, ĉar estas sufiĉe trarigardi la instrulibron de E. Vilisics por ĉion kompreni pri tio: ni sekvis ĝin unu paĝon post la alia; eventuale oni vidu la "GRADIGO DE LA LINGVA MATERIALO" fine de ĉi tiu raporto.

Kompreneble, por instrui E-on ni bezonis plian lernadon de ĝi; ekde oktobro ni komencis frekventi duagradan E-kurson finiĝontan junie 1994-a (Vd. la finan Noton). Fine de novembro s-ro Bourlot partoprenas, invitite, en la Novembra Paderborna Renkontiĝo, kie li raportas pri la L.O.I. en Italio; S-ino Vilisics prezentas LUDU KUN NI!. En la.N.P.R. partoprenas instruistoj el multaj landoj.

Fine de decembro la Ministeria Komisiono "Matulli" finas siajn laborojn rekomendante eksperimentan enkondukon de la I.L-o en la italajn bazajn kaj submezgradajn lernejojn. (RIM. komisiona rekomendo ne devigas Ministron agi laŭ ĝi). E.R.A. disvastigas la konkludojn de la Komisiono. (Submezgrada Lernejo=*Scuola Media Inferiore*; ĝi estas trijara deviga kurso frekventata post la Baza Lernejo= *Scuola Elementare* ekde la 11-a jaraĝo). En la konkluda raporto de la Komisiono, inter la plej elstaraj ag-proponoj, estas baldaŭ publikigi ministerian dekreton por aldoni, ekde tuj, la I.L-on al la fremdaj lingvoj instrueblaj bazlerneje.

Aparte interesa estas la ĉapitro, kiu pritraktas la tezon pri I.L-o kiel ilo de Lingvo-Orientiga Instruado, priskribante pedagogiajn-didaktikajn eksperimentojn faritaj en multaj eŭropaj landoj inter1918 kaj 1988.

Fine de januaro, kontrolante la faritan laboron, la instruistoj rimarkas, ke la lernantoj bone laboris dum la unua duono de la lernojaro: la rezultoj de la E-instruado estas eĉ pli bonaj, ol ili hipotezis.

Komence de februaro alvenas letero de Katalin Smidéliusz, elstara esperantistino el Szombathely (Hungario), kiu instruas, krom E-on, ankaŭ la italan en la tiea Ateneo. Ŝi proponas, i.a. korespondigi siajn studentojn kun niaj lernantetoj en la itala: tia korespondado estus utila al ambaŭ grupoj, kiuj fakte bezonas skribe uzi ... la italan; s-ino Smidéliusz havas 9-jaran filinon, kiu komencis lerni E-on kaj povus korespondi kun iu el niaj lernantoj en Esperanto. Oni ŝatas ambaŭ ideojn, kiuj efektiviĝos dum la sekvaj monatoj.

Marton komencas alveni leteroj de kelkaj klasoj el eksa Sovetunio, kie dudeko da bazlernejaj instruistoj komencis lingvo-orientigan instruadon de Esperanto jam en la 1993-a. Bedaŭrinde, pluraj neeviteblaj aferoj malpermesos akurate respondi. Fine de marto geedzoj Bourlot vizitas s-inon Smidéliusz en Szombathely; ili faras prelegon pri la itala lerneja sistemo en la urba Ateneo por la studentoj kiuj fariĝos bazlernejaj instruistoj kaj instruos la italan al siaj lernantoj. Karlo kaj Maria Tereza renkontiĝas ankaŭ kun la studentoj de la Atenea E-kurso. Prof-ino Smidéliusz gvidas en tiu Ateneo kaj kurson de itala lingvo kaj E-kurson.

La italaj vizitantoj bedaŭras, ke eĉ ne unu studento frekventas ambaŭ kursojn: estas evidente, ke propedeŭtika antaŭa instruado de Esperanto ege faciligus la lernadon de la itala al la hungaraj lernantetoj. Prof-ro István Szerdahely pruvis 50%-an gajnon ĉe la lernantoj de la franca, kiuj antaŭe lernis la Internacian Lingvon; hungaroj devus havi proksimume samgradan gajnon en la lernado de la itala se ili antaŭe lernas Esperanton. Katalin Smidéliusz verkis tezon titolitan "La propedeŭtika valoro de Esperanto en la instruado de la itala al la hungaroj"; oni esperas, ke ŝiaj gestudentoj profitu la raran eblecon trovi ĉe unu kompetentulo du tiel kongruajn fakojn.

La preparo de vojaĝo kaj restado ekster Torino ege laborigas ĉiujn instruistojn de la tri Duaj Klasoj dum marto kaj post la paskaj ferioj. Ekde la 11-a ĝis la 15-a de aprilo elveturinte el Torino, la tri klasoj restadas en Loano (ĉemara urbeto, kie la Urbo Torino posedas Domon, en kiu ĝi gastigas torinajn klasojn por konigi la ĉemediteranean medion al infanoj vivantaj en urba medio). Reveninte "hejmen", la laboro pri tiu travivaĵo postlasas nur la tempon por kompletigi la instruan programon: oni devas ordigi materialojn, skribi raportojn...

La 9-an de Majo IRRSAE.-MARCHE (Regiona Instanco por la Edukaj Serĉado, Eksperimentado, Ĝisdatigo) organizas en la Ancona regiono Marche *(pron.. Ankona, Marke)*: unutagan kunvenon "RAJTO PRI LA LINGVO; RAJTO PRI LA LINGVO INTERNACIA", en kiu invitite partoprenas s-ro Bourlot kiu raportas pri "Kial kaj kiel enkonduki Esperanton en la bazajn lernejojn" kaj s-ino Vilisics, kiu prelegas pri "La valoro de Esperanto, kiel propedeŭtiko" kaj prezentas "LUDU KUN NI!". Malfermas la laborojn Giorgio Pagano *(pron. Ĝorĝo)* sekretario de E.R.A.(E-Radikala Asocio) kaj Andrea Chiti-Battelli *(pron.: Kiti-...)* Prezidanto de E.R.A. Partoprenas en la kunveno kvindeko da instruistoj el Regiono Marche kaj la Provinca Lernejestro (Itale: *Provveditore agli Studi*) de Ascoli Piceno *(Askoli Piĉeno)* D- ro Giuseppe Maraglino, aktiva subtenanto de la I.L-o.

La 15-an de majo en Cuorgne (provinco de Torino) okazas inaŭguro de publika ĝardeno dediĉita al L.L.Zamenhof. En Cuorgne S-ro Vinicio Bussacchetti *(Viniĉo Bussakketti)*, 80-jaraĝa E-isto, instruas E-on al du Duaj Klasoj po duonhoron semajne dum la nuna lernojaro profitante de la kunlaboro de du klasaj instruistinoj kaj haviginte al si la rajtigon de la Lernejestro kaj la subtenon de la tiea skabeno de la kulturo.

Je la 4-a de junio en la Universitato de Torino ERA prezentas 48-paĝan broŝuron titolitan PERCHE' L'ESPERANTO A SCUOLA? = KIAL (enkonduki) ESPERANTON EN LERNEJOJN? Aranĝinte la tuton, prezidas la kunvenon Fabrizio A. Pennacchietti, universitata Profesoro pri Semida Filologio ĉe la Beletra Fakultato de la Universitato de Torino, elstara kaj aktiva E-isto, Prezidanto de T.E.C. (Torina E-Centro), Prezidanto de la E-Katedro de Torino kaj Delegito de U.E.A.

Veninte el Romo, Sekretario de ERA Pagano, raportas pri la nuna stato de nia afero. Krom dekoj da lokaj esperantistoj kaj pluraj ERA-anoj partoprenas en la duonjara kunveno kelkaj estroj de ŝtataj Bazaj Lernejoj el Torino kaj Vinicio Bussacchetti el Cuorgne. Du lokaj televidaj stacioj dissendas informojn kaj intervjuojn pri enkonduko de E-o en la devigajn lernejojn kaj pri la prezento de l'antaŭdirita broŝuro. Pri la stato de la E-instruado en la lernejo "GAETANO SALVEMINI" raportas ties estro: Dr-ino Vanda Piccolomini *(Pikkolomini)*.

Prof-ro Fabrizio Penriacchietti *(Fabricjo Pennakkietti)* anoncas, ke la Universitato de Torino starigis dujaran kurson pri INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO; li mem gvidos tiun kurson ekde oktobro.

La 8-an de junio finiĝas la lernojaro por la infanoj de niaj tri Duaj Klasoj. El kvindeko da lernantoj, nur du malsukcesas. Por la instruistoj la laboro daŭras ĝis, pli-malpli, la fino de junio.

Antaŭ ol la infanoj feriis, Elisabetta Vilisics Formaggio vizitis ilin iun posttagmezon en la Lernejo Salvemini, ravante ilin per ĉarma babilado kaj per tre granda atento al iliaj demandoj, paroladoj, rimarkoj. La lernantoj estis unuafoje vidantaj la aŭtoron de la E-lernolibro, kiun ili uzis, kiel unuan fremdlingvan lernolibron. Plie, la aŭtoro de LUDU KUN NI! estis unuafoje vizitanta klason da tiaj lernantoj, por kiaj ŝi estis verkinta sian lernolibron. Okazis tre interesa renkontiĝo.

La 25-an kaj 26-an de junio okazas en Romo la KVARA KONGRESO de ERA; Stefania Zaccagnini pritraktas la projekton FUNDAPAX, kiun ERA prezentis al Unesko.; Alessandro Conti raportas pri la iniciatoj en la bazaj lernejoj kaj Umberto Broccatelli raportas pri la transnacia E-ista korespondado de ERA., Fabrizio Pennacchietti pri la starigo de E-instruado en la Universitato de Torino, Carlo Bourlot kaj Leonardo Pampaloni pri rezultoj kaj perspektivoj de la E-eksperimentado en bazaj lernejoj.

La Konsilantaro de ERA. elektas F. Pennacchietti, kiel Prezidanton de ERA.

GRADIGO DE LA LINGVA MATERIALO POR DUA KLASO

(Infanoj 7-8jaraĝaj)

TEMA ENHAVO: " La eta mondo de la infano: familio, lernejo kaj la amika, rondo"

VORTPROVIZO: proksimume 350 vortradikoj elektitaj inter la plej oftaj en la ĉiutaga lingvo rilate la indikitajn temojn

FINAĴOJ: -o, -a, -as, -e, -i, -j, -n

AFIKSOJ: sufiksoj : -in, -id, -il
prefiksoj: ge-, mal-

GRAMATIKAJ KATEGORIOJ

verboj - indikative, estante
- infinitive
- imperative

nomoj - komunaj

pronomoj - personaj
- posedaj
- demandaj
- montraj

adjektivoj - kvalitaj
- posedaj
- kvantaj numeraloj bazaj

artikolo

adverboj senfinajaj: jes, ne, ankaŭ, tre, tro, ...

prepozicioj: en, sur, al, el, de, da, kun, sen, per

konjunkcioj: kaj, aŭ, sed, ke

demandovortoj : ĉu, kiu, kio, kia, kiam

LA KOMPLETA SISTEMO DE SONOJ KAJ LITEROJ

Ĉio el la supre priskribitaj programeroj estas atingita.

Torino, la 21-a de Julio 1994-a,

La kunordiganto
(Carlo BOURLOT)
DIREZIONE DIDATTICA STATALE
"GAETANO SALVEMINI"
Via Negarville 30/6
I-10135 TORINTO, ITALIO.
Tel: 847 08 07

ALVOKOJ

♦ **Deziras instrui:** Mi volonte instruos Esperanton en lernejo aŭ gvidos kursojn iu ajn lando, se oni garantios loĝ-eblecon tie. Mi parolas Esperanton dum kvin jaroj kaj plenumis la super-nivelan ŝtatan lingvo-ekzamenon en Hungario. Mi estas 24-jara sendependa fraŭlo. Bv. skribi al: FARKAS János, Pf. 1159, HU-1463 Budapest, Hungario.

♦ ***Heroldo* gajnis la premion FAME:** La germana fondaĵo FAME asignis al *Heroldo de Esperanto* kaj al la verkistino Spomenka Stimec la kultur-premion 1994 (po 5 mil markoj), pro ilia kontribuo al la disvastigo de kulturaj verkoj kaj subteno de internacia kompreniĝo.

La sendependa gazeto *HdE*, nun aperanta 16-foje jare, estis fondita en 1920 de Teo Jung kaj honorofice redaktata de 1961 de s-ino Ada Fighiera-Sikorska. Ĝi aperis 1900-foje en pli ol 6 milionoj da ekzempleroj kaj sendata en 70 landojn. Heroldo plie eldonis ĉ. 100 librojn kun sume pli ol 20,000 paĝoj. Famajn fariĝis ĝiaj plurfoje reeldonitaj lernolibroj en Esperanto, angla, hispana, franca, itala, kaj baldaŭ en la germana.

Kiam *Heroldo* estis malpermesita, Teo Jung fuĝis kun ĝi en Nederlandon. La gazeto aperis en Scheweningen (NL), Bruselo (BE), Madrido (ES) kaj, nun, en Torino (IT). Petu senpagan specimenon ĉe: *Heroldo*, Via N. Sandre, IT-10078 Venaria R (Torino), Italio.

♦ **Asteriks:** Tiu mondfama heroo entuziasmigis plurajn generaciojn da legantoj en 42 landoj en tri kvaronoj de la mondo. Unu titolo konkeris la korojn de esperantistoj antaŭ dek kvino da jaroj. Nun Kroata Esperantista Unuiĝo anoncas planon aperigi la 48-paĝan titolon *Asteriks la gladiatoro*, invitante antaŭmendojn je 16,80 NLG plus 10% (min. 5 NLG) por sendokostoj, al la konto *kreu-g* ĉe UEA. Planata estas regula aperigo de kajeroj.

♦ **Enketilo:** Denove ILEI aperigis en sia tria numero de Juna amiko enketilon pri lerneja aŭ kursa instruado de Esperanto je ajna nivelo por 1994/95. Kiu instruas la lingvon, aŭ scias pri tia kazo, bv. peti ekzempleron de tiu enketilo. La mendilo sur p. 20 uzeblas tiucele. La informojn ni ne nur aperigos en Juna amiko/IPR, sed enigos en komuptilan datumbazon por pli sisteme kaj flekseble teni rilatojn inter praktikantaj instruistoj. Ni preferas ricevi informojn ĝis marto 1995, sed iam ajn oni rajtas resendi la enketilon.

♦ **Temoj de *Juna amiko* 1995**

Numero 1: Ni komencas kaj finas ion. Io komenciĝas kaj finiĝas.

Numero 2: Kion vi plej ŝatas manĝi kaj trinki?

Numero 3: Kiel kaj kion vi plej ŝatas lerni? Kia estu ideala instruisto?

Numero 4: Kion ni konservu, kion ni ŝanĝu?

KONTRIBUU ALT-NIVELE al IPR

La komputika revolucio demokratigis la komunikadon, permesante al ĉiu ajn komputil-posedanto ekesti eldonisto. Kiam temas *IPR* kaj *Juna amiko*, ĝi fine permesas ankaŭ demokratiigon (pli justan disdividon) de la preparlaboroj!

Ne estos al vi revelacia la konstato, ke IPR grave perdis sian eldon-ritmon. Dum la respondeco por samtempe ĝi, *Juna amiko*, kaj la tuta eldon-programo de la Ligo restas bazita en Budapeŝto, perspektivoj por renormaligo ne estas rozruĝaj. Sed jam du kontribuantoj (unu la liga prezidanto, alia kies kontribuon eblos vidi en la venonta numero) signife kontribuis al la suma feliĉo de la redakcio, liverante artikolojn taŭge prespretaj. Eĉ nekomputilistoj havas unu eblecon helpi al ni. Esence estas tri manieroj helpeme liveri artikolojn:

❶ Sendi surpaperajn tekstojn taŭgaj por maŝina legado. La redakcio disponas je la hungara programo de Optika Karaktro-Rekono (OKR), *Recognita Plus 2.0*. Por ke ĝi plej efike legu viajn manuskriptojn:

a) Uzu klare nigrajn literojn de elektra tajpilo aŭ lasera aŭ inkŝpruca printilo, sur pura blanka papero, sen superfluaj makuloj kaj faldoj.

b) Ne estu mane aldonitaj korektoj aŭ komentoj. Tiajn skribu dorse!

c) Ne uzu substrekojn aŭ d u o b l a spacado por elstarigi vortojn. Prefere uzu **dikecon** aŭ *kursivecon* tiucele, aŭ sendu duan kopion, sur kiuj la elsatarigoj estas indikitaj. Provu ne verŝi kafon sur la manuskripton.

ĉ) Ne centrigu titolojn, ni faros tion. Ili staru maldekstre.

d) Uzu nur maŝine formitajn supersignojn — tiajn Recognita kapablas legi kaj eksporti.. Se via maŝino ne kapablas supersignojn produkti, ne aldonu ilin mane, prefere ellasi ilin entute (ni aldonos ilin!) aŭ uzu konsekvencan sistemon, ekz. ŝ = sx, ĉ = cx ktp., kiun ni povas aŭtomate ĝustigi.

❷ Sendu provan tekston per IBM PC komputila disko (ĉu 5,25 cola, ĉu 3,5) por ke ni provu, ĉu via disk-formatigo kongruas kun nia. Sendu tekstojn:

a) en simpla ASCII-formato kun supersignoj kiel supre (ekz. sx aŭ s^ por ŝ)

b) Laŭ Word for Windows 2.0 uzante la esperantajn literarojn de *Eventoj*, kiujn ili tre favore disponigas al aktivuloj — kaj al ni. Prefere uzu la literspecojn *Tempo Esperanto* (la nuna!) aŭ *Orion Esperanto* (senserifa).

❸ Se vi fidas, ke via teksto estas lingve kaj enhave matura, vi povas komputile surpaperigi ĝin mem kaj sendi ĝin prespreta. Via sistemo ne devas esti *Winword*, nek eĉ bazita je *IBM PC*, sufiĉas, ke ĝi povu krei tesktojn, kiuj similas al tiuj en *IPR* aŭ *Juna amiko*. Plej grave:

a) La tekstareo estu 11,5 x 17,0 cm. (Do, sur A4-paĝo kun marĝenoj supre-sube de 6,3 cm kaj ambaŭflanke de 4,75 cm. Paĝnumerojn ni aldonos.

b) Korpa teksto similu al *Tempo Esperanto* 10- aŭ 11-punkta kun ĉef-titoloj 16-punktaj. Aliajn normojn vi konstatu el aperintaj numeroj.

Se vi uzas *Winword*, vi povas kompreneble sendi artikolon kaj surpapere kaj surdiske, tiel, se ĝi jam taŭgas, ni rekte uzos la paperan version; se ni volas ŝanĝi ion, ni uzos la diskan version.

Tio ne signifas, ke ne plu bonvenas tekstoj ĉu manskribitaj ĉu tajpitaj per mekanika skrib-maŝino — ĉion ni taksos laŭ la enhava valoro! *smg*

RECOGNITA PLUS 2.0
Multlingva Programo de Karaktro-Rekono

OKR-Programo por 80 lingvoj ĝis inkl. la pola, ĉeĥa, hungara, turka, litova, malta kaj Esperanto, akceptanta tekstojn el pli ol 70 skaniloj kaj eksportante la rezulton al pli ol 60 tekst-redaktaj programoj. Petu informojn en Esperanto de: Recognita Corp., P.O. Box 55, HU-1251 Budapest.

Esperantaj karaktraroj por Windows de la duan semajna revuo EVENTOJ

Por pretigi numeron de la nova inform-gazeto Eventoj, la redakcio devis ellabori supersignan solvon por la sistemo *Windows*. Ĝi kreis pli ol 30 skaleblajn litertipojn, kaj disponigas kvar el ili senpage al abonantoj de la revuo. La tutan kolekton ĝi vendas tre modest-preze. Petu pri ili kaj la revuo ĉe: *Eventoj*, pf. 87, HU-1675 Budapest.

Pola sekcio kunvenas

En Limanovo kadre de somerferia restado de E-ensemblo Silezio fine de junio okazis kunveno de la pola sekcio de ILEI. Partoprenis 13 personoj el 3 landoj: Brazilo, Nederlando kaj Pollando. Ĉiutage gvidata estis leciono laŭ diversaj instru-metodoj: tradicia, reagiga, programita kaj Cseh-instruado. Okazis prelegoj de la brazila akademiano prof. Geraldo Mattos pri la verbo-sistemo, vort-farado kaj instru-helpiloj. La partoprenantoj ekskursis al la plej pitoreskaj lokoj de la beskida regiono. Vespere okazis renkontiĝoj kun infanoj de la arta ensemblo. La estraro decidis, venontjare aranĝi didaktikan kunvenon de la sekcio en Krakovo kadre de Esperantaj Printempaj Tagoj de Krakovo, de la 1a ĝis la 6a de majo 1995. Temo: Freinet-pedagogio. Informoj: d-ro Antono Tabacki, p.k. 490, PL-40-800 Katowice 2.

Du poeziaj gazetoj!?

Hungaria Esperanto-Asocio anoncas la lanĉon de pripoezia revuo, sub redakto de Miklós Fehér. Li petas, ke ĉiu sendu la plej popularajn naciajn poemojn por infanoj (komence nur 20-24-versaj) kun la ritmo indikita kaj traduko en Esperanto (ĉu polurita, ĉu nur laŭvorta), por ke tiuj estu kvalite haveblaj en Esperanto. Provekzemplero de *Eŭropa poezio en Esperanto* haveblas de HEA, Andrassy u. 27, HU-1061, Budapeŝto, kontraŭ 3 irpk.

Samtempe venas informo el Pollando pri deziro fondi 'la unuan internacian poezian revuon.' Ĝi prezentos i.a. la koncizan vers-formon *Haiku*. Informoj de Aria – Haiku, P.O. Box 57, PL-00-750 Warszawa 12, Pollando.

TUBERO EN LA NUMERO!

Ni malfermas novan diskutigan rubrikon en IPR. En ĉiu numero ni prezentos iun polemikan, ironian aŭ pensigan dirajon aŭ aserton, sen tuj komenti ĝin. Ni invitos viajn reagojn, opiniojn — ĉu defende, ĉu atake, ĉu disflanke — al la *Tubero en la numero*. Jen nia unua provo:

En la cetera mondo,
Post bezono sekvas plenumiĝo.
En Esperantujo,
Post bezono sekvas nur...
... akuzativo!

smg

Sendu viajn komentojn al la redakcio (adreso sur la dua kovril-paĝo), laŭeble ĝustatempe por la sekva tubero-numero!

Vi rajtas krome proponi vian propran tuberon por lanĉi en la dis-k-p-utejon!

Kaj jam fino de la numero. Ni esperas, ke ĝia enhavo plaĉis kaj utilis al vi. Kiel kutime, multaj eroj devis resti por la sekva numero: krom kelkaj longaj fakaj artikoloj, ni devis prokrastigi eĉ du prespretajn artikolojn de József Nemeth el Pápa, alvokon pri nia stipendia fondajo, leteron de Géza Kurucz, recenzon de Arnold Pitt, pritakson de kurslibro de Ton Verwoerd, recenzon de libro de Ronald Glossop, raporton de Atiljo Orellano Rojas el Ganao, ktp.

Ne eblas fermi sen pardonpeti pro la granda malfruo de IPR, kiun ja kaŭzis objektivaj kaj seriozaj obstakloj. Herkula fortostreĉo, en kombino kun bonvola 36-hora trajn-striko, permesas fini la numeron jus antaŭ la Zamenhofa Tago. ILEI povas ĝoji tamen, ke ĝia alia periodajo *Juna amiko* rekaptis sian ritmon – ĝia numero 94/3 disiris novembre kaj 94/4 nun presejas kaj dissendiĝos antaŭ Kristnasko. Ĉefrolos en IPR 94/4 la lastatempe aperintaj lerniloj: *Kunvojaĝu* de Paŭlo Gubbins, *Ludu kun ni!* de Elisabietta Vilisics-Formaggio, *Mil unu vortoj en Esperanto* de BEA kaj (ĉar *lerniloj* komencas ne plu sinonimi kun *lernolibroj*) la kreata vidbenda kurso *Mazi en Gondolando*. La redakcio laboregos, ke ne tro da danuba akvo fluu sub la pontoj, antaŭ la pretigo de tiu numero.

Kun plej koraj salutoj por prospera kaj fruktodona nova jaro! smg

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskus-sairaalankatu 5 M 133, FI-15850 Lahti.
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weisshorn.
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, ES-41080 Sevilla.
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: *vakas kaj konsideru sin forstrekita.*
Koreo: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuslanova 59. HR-41000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordamerika: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: *vakas*
Ruslo: *akceptita sed adreso ne komunikita.*
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: *vakas*

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputiula enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Vidu pli da detaloj sur paĝoj 34 kaj 35. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur via manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado. Regulaj redakciaj kunlaborantoj serĉataj, ekzemple por prizorgi iun rubrikon – prefere kun aliro al komputilo kaj kapablaj liveri materialon diske aŭ presprete.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eu\ropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.